

# EKO 2024

TRA LA  
MONDO  
IRAS FORTA  
VOKO

**Numero 2024:03, januaro 18.** Pezo: Word 40, PDF 350 KB, sume 390 KB

## AMO 107 sukcese en Burundo

La seminario okazis inter la 23-a kaj 27-a de decembro 2023 en Rumonge, Burundo. Ĉeestis 20 personoj el ses provincoj de Burundo. La temo de la seminario estis 'Teknologio kiel potenca ilo por plibonigi edukadon signife en Burundo'. Honoritaj gastoj estis la urba direktorino de Edukado de Rumonge kaj la direktoro de liceo en Rumonge. La temoj lernitaj dum la seminario inkluzivis:

- Kiel plifortigi la esperanto movado en Burundo (Aime Patrick Manirakiza)
- Teknologio kiel potenca ilo por plibonigi edukadon signife en Burundo" (Aime)
- 'Bona varbado' kaj 'Mastrumado de kluboj, (Jeremie Sabiyumva)
- Malkoloniigo de la afrika Esperanto-movado, (Renato Corsetti)
- La seriozeco de teknologio en la mondo (Mireille Grosjean)
- Partoprenu la 109-an UK en Tanzanio, (Jeremie Sabiyuma).



## Sukcesa preparakunsido en Tanzanio

31 geesperantistaj aktivuloj de Tanzanio, Burundo, Kenjo, Kongo DR kaj Germanio lertiĝis, sub respektivaj gvidoj i.a. de Francesco Maurelli, Jérémie Sabiyumva, Maria Rosaria Spanó kaj Costantine S. Mashauri pri kongres-organizado, informado, interpretado, turisma gvidado, teama laboro, merkato, krom per prelegoj kaj aktivaĵoj celante prepariĝi por la 109-a UK, en seminario ĉe la Aruŝa Internacia Konferenca Centro (AICC) de la 5-a ĝis la 7-a de januaro 2024.

La kunsido havas kroman utilon en tio, ke ĝi helpas solvi konkretajn mankojn surloke. *Estas aliaj flankaj bonaĵoj, nome la starigo de Aruŝa Esperanto-klubo, ekvigligo de la kenja asocio, ktp. Sed kompreneble mi esperas ke granda pluso estos antaŭeniri pri la kongresaj laboroj,* komentis Francesco.

Ĉiuj enplektitaj partioj en la preparlaboroj de la unua UK en Afriko pli ol iam ajn antaŭe elturniĝas laŭ siaj ebloj por la rapida pretigo de la aferoj, ke la potencialaj partoprenantoj de la kongreso povu kiel eble plej baldaŭ aliri al la informoj pri kostoj, priskriboj, datoj, partoprenkondiĉoj ktp de la dumkongresaj ekskursoj, antaŭ- kaj postkongresaj programoj. Same, al la informoj pri la loĝkostoj, servoj, distancoj, hoteloj, gastejoj rezervitaj por la kongreso, kaj al aliaj gravaj sciigoj en ligo kun la kongreso. Ĉiuj strebas pleni la truojn tiel ke la afero povu marŝi pli bone.



La seminario estas aranĝita de la projekto *Hakuna Matata*, kies kunmastrumantoj estas la kunordiganto de la Afrika komisiono de UEA, la burundano Aimé-Patrick Manirakiza kaj la tanzaniano John Magessa. Tiu ĉi lasta estis la loka organiza motoro kaj liaj nelacigebla entuziasmo kaj diligento estis kernaj por la sukceso de la seminario. La 109-a UK mem okazos sub la temo “Homo, lingvo kaj medio por pli bona mondo” en Aruŝo, Tanzanio, de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2024. Ankoraŭ eblas aliĝi per <https://uk.esperanto.net/2024/> Adje Adjevi

## Aliĝoj al Aruŝa bone progresas

En la 18-a de januaro aliĝoj por Aruŝa kreskis ĝis 330 personoj el 48 landoj: Germanio 38, Francio 31, Italio 21, Koreio 19, Ĉinio 21, Tanzanio 15, Belgio 16, Usono 15, Brazilo kaj Japanio, po 14.

## Aktivula helpo por kursanoj en Duolingo

Pri la kursaroj en Esperanto, ni havis plurmilajn mesaĝojn de lernantoj [kun multegaj plendoj], ĝis Duolingo forigis ilin. El tiuj mesaĝoj, la volontula teamo povis vidi la amason da demandoj, kiujn la lernantoj ne povis mem respondi, nek trovi utilan informon en la strukturo kaj rimedoj de la Duolingo-kursaro. Pro tio, la volontuloj de la Esperanto-kursaro respondis al unuopaj demandoj, ofte per mult-mesaĝaj diskutoj, kreis tutan ‘libron’ de klarigoj kaj ekzemploj, ligitaj al ĉiu leciono kaj al multaj unuopaj ekzercoj kaj 3) starigis kaj mastrumas fejsbukan grupon, en kiu spertuloj kaj partoprenantoj respondas al ĉiuj demandoj kaj komentoj. En tiu grupo, la gvidantoj disponigas multajn aldonajn, diversajn lern-materialojn el multaj fontoj, kaj kreas novajn specife por la grupo. Tiu grupo momente havas 15.5 mil membrojn.

Derek Roff, [derek@unm.edu](mailto:derek@unm.edu)

## La senlaca Renato al la Eŭropa komisiono

‘Karaj komisionanoj, la jaro 2024 estas elekto-jaro en Eŭropo. EDE en Francio pretigas sin por partopreni la elektojn, sed en aliaj landoj mi ne vidas grandan entuziasmon de la esperantistoj agi por profiti la okazon. Ĉu vi opinias, ke estus oportune relanĉi nian kampanjon en <https://uea.org/vikio/Multlingvismo-esperanto>, informante aparte la kandidatojn pri la elektoj aldone al la ĝenerala publiko? La eŭropa Esperanto-kongreso en Strasburgo maje estos okazo por montri al la aliaj landaj asocioj eŭropaj vian agadon por Esperanto, kaj diskuti la pluiron.

Nome de EKO, ni jam agas kuraĝigi fruktuzon de la elektoj ene de UEA kaj la Eŭropa Esperanto-Komisiono (EEK) sub la gvido de Sean O'Riain. EKO agas simile ene de Hungario. Eble eĉ ILEI en Eŭropo povos ion fari.



## Pri la klubo Verda Flago

La 6-an de januaro 2024, la klubo Verda Flago de Mbanza Ngungu en Kongo DR ekreprenis la kursojn en la kolegio Leopold Sedar Senghor. La kurso okazadas semajnfine, po preskaŭ 2 horoj tage.

Tamen kun la ĉeestantoj mi povis diskuti pri vojaĝo Togolanda. La klubo ne havas fiksan sidejon kaj ĉar granda parto de la klubaj havaĵoj (dekoj da lego kaj lernolibroj, 2 flagoj, Komputilo kaj printilo) troviĝas ĉe mi, antaŭ ol iri al la kolegio, kune kun s-ro Roger kaj s-ro

Baby, du el la estraranoj de Verda Flago, ni katalogis la havaĵojn de Verda Flago. La porkomencanta kurso ricevis multajn aliĝopetojn.

Ni havas printilon donacitan de belga amikino Heidi Goes, sed mankas inkujo en ĝi. Pro tio ni bezonos €20 ĉar ni devas printi lernomaterialojn. Plie, mi komunikis kun la amikoj de Lukala, membroj de la klubo la Stelaro por kunlaborado ĝemelkadre por firmigi la ligojn kaj redinamakigi niajn ambaŭ klubojn. Mi veturos al Lukala en proksima estonteco por pridiskuti la aferon surloke kun tieaj esperantistoj.

Ni ĵuris labori kaj tion ni estas farantaj nun, la klubo Verda Flago estas en kunlaborado kun la Afrika Centro Esperantista, tamen, ni estas malfermaj al ĉiuj, ĉu unuopulo, ĉu esperantistaj institucioj. Nia adreso: [verdaflagoklubo@gmail.com](mailto:verdaflagoklubo@gmail.com)

Arlain Kizeyidioko

## Renkontiĝurboj deciditaj ĝis 2028!

La Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) el Kroatio invitas balkanajn esperantistojn partopreni la 12-an kongreson de kroataj esperantistoj, kiu okazos inter la 21-a kaj 28-a de junio 2024 en Prvić Luka (insulo Prvić, arkipelago de Šibenik). Ĝi estas la unua tia aranĝo okazonta apud la adriatika marbordo, kaj sekvaj kvar kongresoj estas planataj por interno de la lando: Slavonski Brod (2025), Karlovac (2026), Delnice (2027) kaj Vukovar (2028). Krom la labora programo, granda parto de la kongreso en 2024 estos dediĉita al agrabla feriado kaj vizito al vidindaĵoj (ekz. la naciaj parkoj Kornati kaj akvofaloj de la rivero Krka, Primošten kaj Split).

Pliaj detaloj pri la kongreso troviĝas ĉe:

<https://novo.dec-kroatio.hr/eo/kongres-hrvatskih-esperantista-2024/>

Reta aliĝilo:

<https://novo.dec-kroatio.hr/eo/pristupnica-prvic/>

Mendilo por loĝado:

<https://novo.dec-kroatio.hr/eo/narudzbenica-za-smjestaj-2024/>

La unua aliĝperiodo finiĝos la **31-an de januaro 2024**, do eluzu la plej avantaĝajn prezojn kaj rezervu vian kongresumadon, ĉar la nombro da litoj estas limigita.

Kontakto: [dec.kroatio@gmail.com](mailto:dec.kroatio@gmail.com)

## Interlingvistoj ekaŭdos pri István Szerdahelyi

La limdato por sendi prelegproponon al la **Internacia Lingvistica Kongreso** (kiu okazos ekde la 8-a de septembro 2024 en Poznano, en AMU) estas plilongigita ĝis la **1-a de februaro**. Bv aliĝi por plej multnombro montri ke ekzistas konsiderinda grupo de interlingvistoj kiuj serioze okupiĝas pri la tereno. Ĝis nun alvenis tri proponoj por la **interlingvistika laborsesio**. Bv informu min, ke vi sendis proponon, ĉar ni sekcigvidantoj ne havas aliron al la aliĝo, nur post la limdato.

Mi proponas prezenti la **rolon de István Szerdahelyi en interlingvistiko kaj esperantologio**, ĉar ĉi-jare ni festos la 100-jaran datrevenon de lia naskiĝo. Mi redaktas ankaŭ libron el liaj elektitaj verkoj, ja li estas malpli konata ol li meritus. Li vivis antaŭ la reta epoko kaj publikigis ĉefe en Esperanto kaj la hungara. Li instalas la universitatan instruadon de esperantologio kaj interlingvistiko.

Prof. dr hab. Ilona Koutny

## Kurso Koutny en Greziljono

La redaktoro de [edukado.net](https://edukado.net) informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Maratona Eo-kurso kaj IEK-prelegoj  
Gvidantonomo: Ilona Koutny. Aldoninto: BertSchumann  
Tipo: Nova movada kurso  
Loko: Baugé-en-Anjou, Francio.

Vidu ĉe: <https://edukado.net/kursejo?kid=27616>

## Mojosa Muziko el Brazilo

Por aliri al abunda materialo vi devas esti ano de **BrazilMuzika Klubo**, kaj vi povas aniĝi per [www.brazilakolekto.com/brazilmuzikaklubo](http://www.brazilakolekto.com/brazilmuzikaklubo) kaj tiel helpi, ke la Klubo daŭru plu!

La lasta ero en la nuna dissendo: 'defiite', **James Rezende Piton** faris tradukon fidelan al la originalo, kiu nomiĝas *Francinjo Mojosa*:



## Interlingvistiko el Irano

Okazis la unua leciono de la kurso 'Enkonduko al interlingvistiko' de Ahmad Mamduhi, kadre de la Universitato Espero en Baraka, Kongo DR. Jen la registraĵo:

<https://us02web.zoom.us/rec/share/PsmTXnZl3Gq7TX4v9s-IftxM9zM9f2Du4Yc2VHoZH5rsYkaJmcd9Fkq8jn8bdmiH.TqB6qnNxIxZldcoz>

Aliĝoj ankoraŭ eblas per mesaĝo al [UEC-lingvo-fakultato@gmx.com](mailto:UEC-lingvo-fakultato@gmx.com).

Pere de Renato Corsetti

===== vortoj: 1450 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

**ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@ce@gmail.com>.